Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

marto 1991

BIBLIOTHÈQUE
LI
SVI

SVISA ESPERANTO-SOCIETO
INFORMAS

# KOMPLEMENTE AL LA ĜENERALA KUNVENO KAJ KULTURA SEMAJNFINO OKAZONTAJ EN LUCERNO
23-an kaj 24-an de marto 1991

Komplemente al la informoj, kiujn vi ricevis rekte el Lucerno, tiu ĉi cirkulero alportas raportojn, kiujn vi bonvolu atente tralegi, ĉar pri ili malfermiĝos diskuto sen antaŭa laŭtlego de la koncernaj tekstoj.

## RAPORTO DE LA PREZIDANTO

### Nefacila jaro 1990-a

1990 ne estis senproblema jaro. Kiel vi scias, ĝi komenciĝis kun la anonco de la demisio de la redaktoro de **Svisa Esperanto-Revuo.** Ankoraŭ multajn dankojn ni esprimas al Andres BICKEL pro la modela maniero, per kiu li plenumis sian taskon dum pli ol du jaroj. La serĉado de nova redaktoro montris, ke neniu pretas transpreni la koncernan funkcion, kiu reprezentas po plenan laborsemajnon monate.

La kontaktoj, kiujn ni havis kun kelkaj asocioj neesperantistaj montris al ni, ke en Svislando movado kun malpli ol milo da kotizantoj pli kaj pli malfacile vivtenadas propran organon. Ĉirkaŭ ni ĉio parolas pri kunfandiĝo inter gravaj gazetoj. La diskutoj kun dekduo da svisaj esperantistoj kapablaj verki gazet-artikolojn montris al ni, ke manko de talentoj ne karakterizas Svislandon. Kontraŭe en multaj tirkestoj kuŝas publikigendaj manuskriptoj, kiuj ne povis facile proponiĝi al organo, kiu estas duone kultura kaj duone movadeca kaj ne povas akcepti longajn tekstojn. Tial alvenis la ideo ekzameni la problemon laŭ nova orientiĝo: unuflanke ekzistu revuo kultura, aliflanke informilo primovada.

### Literatura Foiro & Svisa Esperanto-Societo informas

Tiu analizo montriĝis prava, ĉar rapide proponiĝis solvo, kiun ni eksperimentos en 1991. En Svislando havas sian eldon-sidejon la nun mondfamiĝinta revuo **Literatura Foiro.** Kial ne ricevigi ĝin al la membraro de Svisa Esperanto-Societo? La 11-an de januaro 1991 en Bellinzona laborkunsido, kiu grupigis la prezidanton de la Kooperativo de Literatura Foiro kaj la prezidanton kaj sekretarion de Svisa Esperanto-Societo, ekzamenis la kunlaboreblojn kaj redaktis 7-punktan mendon de kolektiva abono al Literatura Foiro, kiun la Centra Komitato akceptis en skriba voĉdono kelkaj tagojn poste. Sekvis dua laborkunsido, kiu grupigis la 19-an de februaro en Olten la prezidanton, vicprezidanton, sekretarion kaj kasiston de SES. Ĝi rediskutis la projekton kaj dediĉis sian atenton al la serĉo de redaktoro por la informilo **Svisa Esperanto-Societo informas.** La vicprezidanto Fritz LIECHTI anoncis sian pretecon transpreni tiun taskon kaj ekde la monato aprila laŭ dumonata ritmo la SES-anoj ricevados tute regule A5-formatan informilon, kiun ni esperas, ĉiuj ne nur bonvole akceptos, sed ankaŭ nutros per regulaj sciigoj pri la lokaj kaj fakaj esperanto-aktivecoj.

Tiu dueco **LF** kaj **SI** devus favori harmonian disvolviĝon de la esperanto-vivo en Svislando. Kiuj opinias, ke **LF** estas tro altnivela por la membraro de SES, tiuj eksciu, ke **LF** nuntempe jam havas kvindekon da regulaj abonantoj en Svislando. La aliaj esperantistoj pere de **LF** estos en regula kontakto kun nia idealo laŭ kultura vidpunkto, kaj ni jam scias, ke multaj kontaktitoj sin anoncis kunlaboremaj por la nutro de deko da paĝoj respegulontaj Svislandon kaj ties karakterizaĵojn. La 7-an de septembro 1991 la Centra Komitato reekzamenos la tutan problemon kaj decidos pri la daŭrigo aŭ ne de la eksperimento por la sekva jaro 1992-a.

## Kunsidoj

La prezidanto kaj sekretario sin ofte renkontis en La Chaux-de-Fonds okaze de laborkunvenoj kelkfoje plurtagaj. Kaj la 10-an de novembro 1990 disvolviĝis en Berno kunsido de la Centra Komitato, kiun partoprenis Claude GACOND la prezidanto, Fritz LIECHTI la vicprezidanto, Andy KÜNZLI le sekretario, Ernst VON MAY la kasisto kaj Nicole MARGOT, Dietrich WEIDMANN, Fritz WASSMANN, Paul SCHERER, dum senkulpiĝis Tazio CARLEVARO, Ernst GLÄTTLI kaj Mireille GROSJEAN. Tiu renkontiĝo 5-hora favoris atentan ekzamenon de la problemoj solvitaj kaj solvotaj. Ĝi montris unuanimecon de la vidpunktoj librotenadaj, eldonaj, kunvenaj kaj propagandaj. La agad-limigoj estas ĉefe financaj.

## Regionaj kulturaj semajnfinoj

La Centra Komitato interalie dankis al Nicole MARGOT kaj al la Laŭzana Esperanto-Societo pro la tre sukcesa kultura semajnfino okazinta en Lausanne la 5-6-ajn de oktobro 1990 kaj notis kun ĝojo, ke la 5-6-ajn de oktobro 1991 reokazos tiu aranĝo. Dum en 1990 ĝi estis dediĉita al la renesanca arto dankal la kompetento de Pascal DUBOURG, en 1991 ĝia temo estos "Svislando 700 jaraĝa". Prelegos Tazio CARLEVARO, Alain FAVRE kaj Claude GACOND. Ĉiuj rezervu tiun semajnfinon por esperantlingve analizi la etapojn de la formiĝo de nia lando kaj ankaŭ rigardi al la mondo ĉirkaŭanta Svislandon.

La Centra Komitato estis kontenta ekscii, ke post la ĝenerala kunveno okazonta en Lucerno, Andy KÜNZLI kaj la Lucerna Esperanto-Societo estis pretaj organizi kulturan aranĝon, kiu interalie raportos pri restado de Leo TOLSTOJ en Lucerno. Povu tiu aranĝo ekanonci tradiciiĝontan kulturan semajnfinon ankaŭ en Alemanio.

Pro troa profesia laboro d-ro Tazio CARLEVARO ne povis okazigi en 1990 tiĉinan semajnfinon, sed li antaŭvidas tian kulturan semajnfinon komence de decembro 1991.

## Rilatoj kun la membroj kaj ilia malavareco

En 1990 fakte aperis la du lastaj numeroj de **Svisa Esperanto-Revuo** en januaro kaj aprilo kaj sesfoje la cirkulero **Svisa Esperanto-Societo informas** en januaro, februaro, marto, aprilo, majo kaj septembro. Aldono de poŝtpagilo al tiu informilo instigis SES-anojn al malavareco. Ilin ni jam ekdankis per publikigo de unua listo de donacintoj en septembro 1990 kaj pludankas per la ĉisekva listo. Malavaris Max-Henri BÉGUIN: SF 50.-; Werner LAEDERACH: 50.-; Gertrud MERZ: 30.-; Jean-Noël FRIOT: 50.-; Werner SCHAUFELBERGER: 35.-, Dietrich WEIDMANN: 85.-. La heredaĵo ALSCHWANG siaflanke alportis SF 42'572.85 al SES, post elpreno de la impostoj.

## S.E.S. transprenu siajn respondecojn

Dum jaroj KCE devis plenumi funkciojn ne nur kulturajn, sed ankaŭ propagandajn kaj publik-kontaktajn. Ekde kelkaj jaroj ĝi komprenigis al SES, ke alvenis por nia societo la tempo transpreni la ŝarĝojn en rilato kun la esperanto-informado. Tiuj elspezoj registriĝas en la rubrikoj propagando, varbado, perkorespondaj kursoj kun ŝarĝo de SF 8'948.- kaj Argus kun ŝarĝo de SF 955.40.

Tiu servo havigas al ni akurate eltranĉaĵojn de la gazet-artikoloj menciantaj esperanton, kio ebligas tuj reagi, kiam redaktoro neobjektive plenumas sian ĵurnalistan laboron. Okaze de inform-agado ni povas tuj juĝi pri ĝiaj rezultoj. La nura pago de unu sola artikolo kostus pli ol la elspezo por tiu utila servo, kiu estas nun plene je la ŝarĝo de SES. Ĉiuj sciu, ke Gabrielle GACOND kaj Suzanne GERBER plenumas grandegan servon ordigante kaj analizante tiujn artikol-kolektojn, kiuj konserviĝas poste en la arkivejo CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ĵurnalistoj, esplorantoj kaj lernej-direktoroj venas konsulti tiujn kolektojn, kiuj fakte respegulas la publikan opinion al esperanto.

## Prezidantaj dankoj kaj alvoko al pago de la kotizo 1991-a

Konklude al nia raporto mi ŝuldas dankojn al la membroj de la Centra Komitato, kiuj dediĉas multe da tempo al la plenumo de siaj taskoj, al la kaskontrolantoj kaj al Niklaus WEISS pro la aktiva plenumo de la tasko de UEA-ĉefdelegito. Mi dankas ankaŭ la SES-anaron pro ĝia komprenemo por nia malfacila situacio, kiun ni provis plej kontentige solvi. Ne devonte plu dediĉi miajn fortojn al la solvo de la revua problemo, mi povos senpage plenumi la funkcion de dissendanto de la perkorespondaj esperanto-lecionoj, kio ŝparos al SES multajn elspezojn en la rubriko propagando. Tial ni povis buĝeti pli malaltan sumon en tiu rubriko.

Ni esperas, ke ĉiuj SES-anoj atestos pri sia apogo al nia poresperanta laboro donante pozitivan akcepton de la poŝtpagilo, kiu akompanas tiun ĉi informilon. Ni rememorigu la pagotajn kotizojn, kiuj estos por la jaro 1991:

**Membrokotizoj** (inkluzivas ricevadon de la organoj **Literatura Foiro** kaj **Svisa Esperanto-Societo informas**) jare estas po SF 50.- por persono. (Infanoj kaj geknaboj ĝis 18 jaroj: po SF 5.-; junuloj ĝis 26 jaroj: po SF 30.-; pensiuloj: po SF 30.-; geedzoj: SF 75.-; geedzoj pensiulaj: SF 45.-
**Poŝtĉekkonto:** 80-2372-3 Schweiz. Kreditanstalt 8022 ZH-Rathausplatz (por la konto 653677-40 Svisa Esperanto-Societo).

Ni dankas al tiuj, kiuj jam pagis sian kotizon por 1991. Ĉar estas al ni neeble distingi en tiu ĉi sendaĵo, ĉu ni devas aŭ ne aldoni poŝtpagilon, tial troviĝas po unu en ĉiu koverto. La jam kotinzintoj ne uzu ĝin aŭ konservu ĝin por foje fari donacon al SES.

Nekotizintoj ĉesos ricevi la menciitajn organojn.

## Ĉiuj al Lucerno

**Al ĉiuj SES-anoj mi rememorigas, ke ili estas kore invitataj partopreni al la Ĝenerala kunveno,** kiun mi malfermos precize sabaton 23-an de marto je la 14h00 en Hotelo Monopol & Metropole proksime de la stacidomo, kaj mi esperas, ke multaj povos plilongigi sian restadon en Lucerno por partopreni la interesan postprogramon. Mi rememorigas, ke la kontakt-adreso por la aliĝoj al la vespera programo de la sabato kaj al la matena programo de la dimanĉo kaj por la tranokato, estas nia sekretario Andy KÜNZLI, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens. Tel.: 041 45 55 83.

## Elektoj

La nunaj prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj kasisto estas pretaj daŭrigi sian funkcion reformante por trijara periodo la Centran Komitaton, kiu sin ĉirkaŭos de konsilantaro per alelektoj . Ankaŭ la kaskontrolantoj estas pretaj daŭrigi sian funkcion.

## Ni devus povi fari multon pli

Ni vigle konscias, ke limigitaj estas niaj fortoj. Ofte ni ricevas proponojn por agadoj, kiuj povus esti fruktodonaj. Ni konsilas al la proponantoj mem ekagi. Sed ni konstatas, ke ofte post la vortoj ne sekvas agoj. Ni preferas nelacigeble daŭrigi la entreprenitan laboron, sciante ke la fortigigo de Svisa Esperanto-Societo helpas al la aliaj organizaĵoj ankaŭ laborantaj por aŭ per esperanto en nia lando. Niaj dankoj sin turnas al la lokaj kaj fakaj esperanto-organizaĵoj, al Kultura Centro Esperantista kaj al ties fakoj, al Svisa Radio Internacia kaj al ties esperanto-redaktoroj, al la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds kaj al ties Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, al la eldonantoj, al la verkistoj kaj al ĉiuj esperantistoj, kiuj provas fari ion por aŭ per esperanto.

Nome de la Centra Komitato, la prezidanto: Claude GACOND

-oOo-

## Aldonaĵoj

Apudas nian informilon en la koverto dokumentoj, kiuj eble altiros vian atenton:

a) La informilo 1291-1991 de Svisa Radio Internacia.

b) Specimena numero de la nova revuo **Enigmo.**

c) Invitilo al la **Esperanta printempo en Vieno** (19-22 aprilo 1991).

d) Invitilo de **Dagestana Esperanto-Centro** al la **7-a simpozio de "monda turismo"** (15-19 majo 1991).

e) Invitilo al la **76-a Universala Kongreso de Esperanto** en Bergeno, Norvegio (27 julio - 3 aŭgusto).

f) Informilo pri libro eldonita de Weidmann's Mondo-Servo.

-oOo-

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

# B I L A N C O 1990

| Jarkalkulo | Buĝeto 90 | Enspezoj | Buĝeto 91 |
|---|---|---|---|
| Membrokot. (Inkl. abo SER resp. LF) | 7'000.- | 7'675.- | 7'500.- |
| Abo SER (Resp. LF) | 300.- | 624.- | 300.- |
| Donacoj (sen heredaĵo) | 1'200.- | 1'021.- | 1'000.- |
| Heredaĵo (GEP konto 079) | 68'000.- | 42'572.85 | -- |
| Interezoj malnetaj (SKA, GEP) | 2'000.- | 2'472.10 | 2'500.- |
| Glumarkoj ktp. | 100.- | -- | -- |
| Enspez-sumo | 78'600.- | 54'364.95 | 11'300.- |

| | | Elspezoj | |
|---|---|---|---|
| SER, SI (Buĝ. LF 5000.-, SI 2000.-) | 6'000.- | 2'233.75 | 7'000.- |
| UEA kotizoj | 200.- | 66.- | 100.- |
| Propag., varbado, perkoresp. kurs. | 12'000.- | 8'948.- | 5'000.- |
| CK administrado | 2'000.- | 2'476.60 | 2'500.- |
| Kunvenoj ĝeneralaj k. regionaj | 500.- | 745.- | 800.- |
| Libroj aĉetoj | -- | 17.70 | -- |
| Bankspezoj k. diversaĵoj | 500.- | 61.40 | 500.- |
| Argus | 400.- | 955.40 | 1'000.- |
| Elspez-sumo | 21'600.- | 15'503.85 | 16'900.- |
| GAJNO + / PERDO - | +57'000.- | +38'861.10 | -5'600.- |

| Kapitalo | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| GEP, inkl. heredaĵo k. repago SKA obligacio | | 46'571.75 | |
| Inventaro | | 1.- | |
| SKA KK, inkl. repago SKA obligacio | | 18'830.40 | |
| Vojaĝfonduso junulara | | | 259.50 |
| Anticipaj impostoj, bonhavo de ESV | | 865.30 | |
| Transaj eroj aktivaj k. pasivaj | | | 260.- |
| Kapitalo p. 01.01.90: | 22'789.85 | | |
| + Nuligo fond. jub. 100 jara | 4'098.- | | |
| + Gajno kiel supre | 38'861.10 | | |
| Kapitalo p. 31.12.90 | | | 65'748.95 |
| | | 66'268.45 | 66'268.45 |

| Reserva kapitalo | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| SVB kasobligacioj | | 9'000.- | |
| SVB depos. konto | | 1'014.25 | |
| Anticipaj impostoj, bonhavo de ESV | | 8.80 | |
| Reserva kapitalo p. 01.01.90: | 19'525.75 | | |
| + Interezoj malnetaj (SKA/SVB) | 484.30 | | |
| - Anticipaj imp. SKA p. 1990 | 160.70 | | |
| - Bankspezoj SVB p. 1990 | 12.- | | |
| - Repago Elk.Kap.SKA | 9'814.30 | | |
| Reserva kapitalo p. 31.12.90 | | | 10'023.05 |
| | | 10'023.05 | 10'023.05 |

La kasisto: Ernst von May, Oberuzwil, 31.12.90

Rimarkoj:

SER: Svisa Esperanto Revuo
LF : Literatura Foiro ekde 1991
SI : SES-INFORMAS

**SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)**

**Raporto de la kaskontrolantoj**

La subskribintoj,

Margrit Guldin, Murtenstr. 1, 3008 Bern kaj
Ernst Glättli, Laurstr. 17, 5200 Brugg,

kunsidis la 15-an de februaro 1991 en la domicilo de s-ro Ernst von May en Oberuzwil por revizii la librotenadon de Svisa Esperanto-Societo (SES).

Ni certigis nin pri

- la ĝusta transpreno de la saldoj el la kontofolioj de la pasintjara kalkulo,
- la laŭorda enskribo de en- kaj elspezoj surbaze de ekzistantaj pruviloj,
- la ekzistado de la necesaj banksaldo-pruviloj,
- la korekta transskribo de la unuopaj kontosaldoj en la bilanco-kontojn.

| | | | |
|---|---|---|---|
| La jarkalkulo 1990 enhavas | enspezojn | de | Fr. 54'364.95 |
| | elspezojn | de | Fr. 15'503.85 |
| El tio rezultas | gajno | de | Fr. 38'861.10 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| La bilanco 1990 atestas | aktivojn | de | Fr. 66'268.45 |
| | pasivojn | de | Fr. 519.50 |
| Rezultas je la 31.12.1990 | kapitalo | de | Fr. 65'748.95 |

Al SES plue apartenas la "Reserva Kapitalo". Ĝi estas aparte prezentita en la jarkalkulo de SES kaj sumiĝas la 31-an de decembro 1990 je Fr. 10'023.05.

La kaskontrolantoj povis konstati, ke la librotenado estas modele farita. Tial ili proponas al la Ĝenerala Kunveno aprobi la jarkalkulon 1990, malŝarĝi la Centran Komitaton kaj danki al nia fidela kasisto, s-ro Ernst von May, pro la zorgeme plenumita tasko dum la tuta jaro.

Bern kaj Brugg, la 16-an de februaro 1990 La kaskontrolantoj:

E. Glättli

M. Guldin